

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Aperas dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝo
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 221
3. 12. 1924

Redakcio:
Cefredaktoro: Teo Jung.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Buffin, L. K.
Administracio:
Horrem b. K8ln, Germanlando

Abonprezo ponumera
ĉe duonsemaĵna ekspedado: egal-
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per
loka poŝtfolio 0.15 sv. fk.;
ĉe semajna ekspedado (du numeroj
kune): 0.15 sv. fk.

Anonprezo
po unucentimetra kolonero egalvaloro
de 2— sv. fk. (antaŭpage 1.50 sv. fk.),
minimumo alieco 5 cm.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Universala Verda Propaganda Semajno.

Konsiderinda propono de bulgaraj samideanoj.

La Duonsemaĵna ekzistas.

La hodiaŭa numero estas la unua en la serio de espereble malmultaj sekvantaj duonsemaĵnuloj. Malmultaj? Jes, ĉar ni aspiras la ĉiutagan aperadon. Ĝi ne estas utopio. Ĝia efektiveco dependas ekskluzive de la fervoro kaj seriozezo de la esperantistaro.

Kompreneble jam la duonsemaĵna aperigado senteble pliŝarĝas nian elspezan konton. Krome, ĵus antaŭ kelkaj semajnoj denove plialtiĝis la salajroj (je ĉ. 20%) kaj aliaj kostoj. Tio aldevigas al ni provizoran deficiiton, kiu estas rebonigebla nur per akiro de pli multaj abonantoj. Por sekura ekzistado de nia ĵurnalo

ni bezonas pli novajn abonantojn.

Tiu ĉi nombro ne estas granda, kaj ni ne dubas, ke ni atingos ĝin en la daŭro de la venonta jaro, se ĉiuj niaj legantoj fervore subtenados nin en nia propagando por gajni abonantojn.

Post atingo de tiu milo da novaj abonantoj ni povos pensi pri plia perfektigo de nia ĵurnalo, ĉu per pli ofta aperigado, ĉu per pliampleksigo de la unuopaj numeroj ĉu per plibonigo de ĵurnalo.

Tial, helpu nin baldaŭ akiri la bezonatan plian milon da abonantoj!

Eldonejo kaj redakcio.

La „Verda Semajno“ en Bulgarlando.

Jam pasis la tria propaganda semajno en nia lando. La samideanoj eksciis per ET pri tiu nia aranĝo kaj pri la sukcesoj atingitaj de la du antaŭaj semajnoj. Ili ankaŭ scias, ke ni havis grandajn esperojn je tiu „verda“ semajno. Pri ĝi oni legu la koncernan artikolon en la hodiaŭa n-o de ET. La rezultoj atingitaj dum la ĵus pasinta „verda“ semajno nin igas tute optimistaj pri la estonto de nia movado kaj jam nun ni vidas lajn revojn efektivegataj.

Ĉar sciigoj pri la agado de la samideanoj en la provinco mankas ĝis tiu momento, mi parolas nur pri la propagando en Sofio.

Jam unu semajnon antaŭ la komenco de la „Semajno“ (2—9 novembro) 15 diversstakaj afiŝoj, ĉiu po 1000 ekz., kelkaj alvokoj kaj 10—20000 ekz., da malgrandaj flugfolioj estis finpresitaj. Ĉio estis dissendita en la tutan provincon al la esperantistaj grupoj kaj apartaj agemaj samideanoj.

Dimanĉe, 2 novembro, la plej granda universitata aŭditorio estis plene plena je homoj. La kunveno prezidis universitata profesoro D-o Prof. Josif Fadenheht. Parolis s-oj At. D. Atanasov, G. Aktarĝiev, kaj la fremdlandaj samideanoj Hugo Bär (germano) kaj Eugenij Kaghy (hungaro). La impresado de la paroladoj, precipe de la alilandulaj, tradukataj bulgaren, impresis bonege.

Antaŭ la kunveno aeroplano flugis super la urbo disjetante propagandajn flugfoliojn kaj sciigojn pri la kunveno.

Dua granda publika kunveno okazis sabate, 9 novembro, organizita de la Akademia Esperanta Grupo. Parolis s-oj At. D. Atanasov kaj G. Vartolomeev. Ĉe granda entuziasmo prenis la

parolon ankaŭ la universitata profesoro D-o Iv. Ŝiŝmanov.

Tria kunveno okazis dimanĉe, 9 novembro, sub la prezido de universitata profesoro Miĥ. Arnaŭdov. Parolis s-oj Sim. Peikov, Petr Jordanov, St. Minkov pri UEA kaj s-ino Lidia Prof. Ŝiŝmanov pri la XVI-a Kongreso kaj pri la naciaj kongresoj en Ruse kaj Arad.

Post la kunveno ĉirkaŭ 50 esperantistoj iris en vegetaranan restoracion, kie ili tagmanĝis kune.

Dum la semajno okazis trileciona senpaga kurso, en kiu s-o At. D. Atanasov prezentis al multnombra publiko per klarigaj bildoj la skemon de la lingvo. Tuj post la fino de la semajno je 10 novembro komencis oficiala dumonata kurso kun pli ol 70 gekursanoj.

Okaze la „verdan“ semajnon, ĉiuj tagĵurnaloj raportis pri Esperanto, kelkaj publikigis grandajn artikolojn.

Pri Esperanto ekparolis eĉ humoristaj gazetoj.

Pri la agado en la provinco oni povas nur supozoj. La grandaj merkatoj de propaganda literaturo kaj de lerniloj estas bonega montrilo, ke ankaŭ tie ekbolis propagando tie vigla, pli vigla kaj pli sukcesa ol ĉiam ĝis nun.

Nur trian iojon ni propagandas laŭ tiu metodo, amase, kaj ni estas trege kontentaj pri la sukcesoj atingitaj. Oni jam ne plu silentas pri Esperanto, oni ne primokas ĝin, se oni aŭ laŭdas aŭ kontraŭparolas, sed tamen parolas. Ĉar oni vidas, ke Esperanto estas forto, ke post ĝi staras armeo.

Estus do domaĝe, se plej baldaŭ ĉiuj Esperanto-societoj en la tuta mondo ne alprenus tiun batalmetodon, aplikante ĝin konforme al la lokaj cirkonstancoj.

Samideanoj, sekvu nian ekzemplon por la bono de nia movado!

La estonto de nia movado estas en niaj manoj. *D. Simeonov.*

Vidu nian sperton!

Ĵus pasis kun granda sukceso la jam tria „verda“ propaganda semajno de la bulgaraj esperantistoj.

Certe, la demando pri la maniero de plej vasta kaj rezultodona propagando interesas ĉiun Esperanto-organizadon, kaj ni montrons ĉi-sube nian sperton, kun espero, ke ĝi estos utiligata de ĉiuj samideanoj kaj ke la „verda semajno“ fariĝos unu konstanta tradicio en la tuta esperantista mondo.

„Verda Semajno“ — tio estas ĉiujare la semajno, dediĉita al organizita atako en la tuta lando. Ĝi daŭras de la unua ĝis la dua dimanĉo de monato novembro. Tiam la bulgaraj esperantistoj mobilizas siajn tutajn fortojn, kaj dum tiuj sep tagoj oni faras plej intensan propagadon por Esperanto, uzante ĉiujn konatajn rimedojn por propagando: publikaj kunvenoj, mallongaj demonstraciaj kursoj, afiŝoj, flugfolioj (disdonataj enmanen aŭ jetataj el aeroplanoj), ekspozicioj, amuz-vesperoj, ĵurnalarikoloj ktp. Ĉio estas aplikata laŭ preparita plano. Dum tiuj ĉi tagoj malagema esperantisto ne ekzistas. La granda bruo per afiŝoj kaj ĵurnalsciigoj vekas eĉ malnovajn dormantajn esperantistojn, kaj niaj kunvenoj unuigas ĉiujn samideanojn.

Ni propagandas en la vasta publiko nur unu semajnon — sed tio valoras kiom dekmonata propagando. La reston de la jaro ni dediĉas al esperantigo (sed vera esperantigo) de la varbitoj kaj al organizado de la esperantistoj kaj de la servoj per Esperanto. La lasta punkto estas plej grava, ĉar sen ĝi eĉ plej brua propagando ne donos daŭrajn fruktojn kaj restos nur

vana uzo de energio. Tiel nin trovas pretaj la sekvanta verda semajno — post unu jaro, kaj ree la varbitoj dum ĝi trovas organizitan medion, kiu ilin akceptas.

La publiko, scianta la vastan dimension de la propagando dum tiuj tagoj, sentas la forton de la organizita anaro kaj estas influata de ĝia insisteco. Ĝi vizitas amase la propagandajn kunvenojn.

Pli grandan efikon havas la afiŝa propagando. Krom alvokoj al la publiko, ni presigas per komune en la tuta lando kolektitaj monrimedoj grandan kvanton da diversformataj kaj diverskoloraj afiŝoj kun mallongaj, sed energitaj propagandaj tekstoj. Jen ekzemple kelkaj similaj:

I. Lernu Esperanton!

II. Esperanto estas la plej facila lingvo en la mondo, elernebla eĉ de malmulte instruitaj personoj.

III. Esperanto estas lingvo provita en ĉiuj regionoj de la vivo — ĉiutaga parolado, komerco, literaturo, poezio, teatro, opero ktp.

IV. Esperanto estas la latina lingvo de la demokratio.

V. Esperanto apartenas al neniu nacio, al neniu partio, al neniu religio.

Esperanto apartenas egale al ĉiuj, al la tuta homaro!

VI. Esperanto kunligas junulon per korespondo kun liaj kolegoj el ĉiuj landoj.

Esperanto kreas pli grandajn interesojn ĉe la junulo kaj plivastigas lian intelektan horizonton. Esperanto portas kulturon kaj klercon.

VII. La plej granda baro por la normala disvolvigo de la internaciaj rilatoj estas la multlingveco.

La hodiaŭa produktado estas nepensebla sen internaciaj rilatoj.

Esperanto forigas la baron, kreadan de la multlingveco kaj helpas por la faciligo kaj plimultiĝo de la internaciaj rilatoj.

VIII. La esperantistoj opinias, ke estas pli nature, se oni uzas ariefaritan lingvon, kiu ebligas al la homoj el diversaj nacioj interkompreni sin, ol se la homoj kun siaj naturaj lingvoj staras unu kontraŭ alia kvazaŭ mutaj, ne povante interŝanĝi eĉ unu homan penson.

IX. Post Esperanto ne staras unu nacio kun aspiroj konkuri ekonomie la ceterajn popolojn per la influo de sia lingvo.

Post Esperanto staras la tuta mondo. X. Esperanto ne estas malamiko de la naciaj lingvoj, ĝi ne celas ilin anstataŭi, sed vice al ili servi nur en la rilatoj de homoj el diversaj nacioj.

XI. Kiu povus esti kontraŭ Esperanto?

Nur tiu kiu ne deziras, ke ankaŭ homoj, ne havintaj la bonajn kondiĉojn klerigi, povas posedi fremdan lingvon kaj partopreni en la internacia vivo.

XII. Parto el la homaro estas jam ligita per Esperanto.

Se vi havas pli vastajn interesojn, se la limoj de la patrolando ne haltigas vian rigardon, se vi deziras preni vian parton en la komuna vivo de la tuta homaro, — eniru la rondon de la esperantistoj!

XIII. Per Esperanto la internacia vivo ĉesas esti monopolo de unu malmultenombra elito da feliĉuloj, kiuj havis sufiĉe da tempo kaj mono por ellerni fremdajn lingvojn en aliaj landoj, sed fariĝas alirebla al ĉiuj.

XIV. Hodiaŭ multaj inteligentaj bulgaroj, kun mez-aŭ alt-lerneja klerco, ne povas interkompreniĝi kun fremdulo. Kiam ili estas kun tia, ili staras kvazaŭ mutaj, ili ne estas jam la doĉitaj de la naturo estaĵoj per parolpovo, sed estas bestoj senparolaj.

Kontraŭ tio ni montras bulgarajn neinstruatajn laboristojn kaj vilaĝanojn, bulgarajn dekjarajn infanojn, kiuj dum malpli ol unu jaro estas ellernintaj Esperanton kaj estas parolintaj per tiu lingvo libere kun fremduloj.

Ĉe tiu ĉi efektiveco Esperanto ne povas ne altrudi sin nepre al la mondo! — ktp. —

La afiŝoj, presitaj en multega kvanto en Sofio, estas dissendataj ĉien en la lando, kie estas esperantistoj. Tiamaniere la lando dronas en afiŝoj dum la semajno.

Ĉu vi komprenas, kiom efikas tiaj energiaj deklaroj, kiom da koroj kaj cerboj estas gajnataj por Esperanto dum la verda semajno?

Ĝis nun la rezultoj de la verdaj semajnoj estis bonegaj. Dum ili estis vendataj grandaj kvantoj da lerniloj kaj propagandaj broŝuroj.

Sed la imponanteco de tiu propagando estas multe pli granda kaj majesta, se en la tuta mondo samtempe ekstartas „verda propaganda semajno“. Prezentu al vi, kien efikon sur la publikon havos la solena deklaro de oratoro: „Hodiaŭ, en tiu ĉi momento, sur la tuta terglobo, en la frosta nordo kaj en la varma sudo, en urboj, urbetoj kaj vilaĝoj, homoj dediĉitaj al unu ideo por diversaj lingvoj predikas tiun ĉi ideon. Ĉie en tiu ĉi momento estas kolektitaj homoj, kiuj aŭskultas parolojn pri la sama ideo: . . . ktp.“

Allilandaj samideanoj, alprenu nian metodon! Baldaŭ ekbaldaŭ la vigla Esperanto-agado, kia nun ne estas eĉ imagibla!

Alprenu, ke de la unua ĝis la dua dimanĉo de novembro 1925 okazis la Universala Verda Propaganda Semajno, la atako de la tutmonda esperantismo.

Ĝis tiam — ne perdu vane tempon en atendo! Organizu antaŭe la unuan verdan semajnon en via lando plej baldaŭ, kaj post ĝi, atendu kun ricevita sperto la venon de la Universala Verda Semajno dum novembro 1925, kiam eksonos la trumpeteto esperanta, vokanta la pacajn batalantojn el ĉiuj teranguloj al la plej majesta batalo — la granda paŝo al la triumfo de Esperanto!

A. D. Atanasov, Ada.

Esperanto kiel klara telegrafilingvo.

La estraro de la sveda ŝtata telegrafo deklaris sin preta subteni proponon pri Esperanto kiel klara lingvo en la internaciaj telegrafaj komunikoj.

De la telegrafa unuigo en Bern ĝi ricevis demandon, ĉu Esperanto estas permesata por telegrafado en Svedujo. La estraro de la sveda telegrafo siavice skribis al la sekretario de la Sveda Esperanto-Federacio, kiu en skribajo faris klarigon pri la mondlingva problemo ĝenerale kaj la nuna stato speciale. Poste la estraro respondis, ke ĝi estas preta subteni proponon pri Esperanto kiel klara lingvo.

H. Halldor.

Reveno de la elmigranto.

De Marcus Eli Ravage.

Antaŭ tri jaroj mi ensiĝis revenante de Ameriko por viziti la hejmlandon. Sur la ŝipo estis kroato kiu same kiel mi vojaĝis triklase. Lin akompanis edzino kaj du infanoj. Dum longa tempo li ne amikiĝis kun mi, li estis tre singardema, kaj sendube li estis kamparano. Fine, pere de liaj infanoj, mi gajnis lian konfidon.

„Ĉiam en Ameriko“, li diris, „mi deziregis reiri hejmen kaj tie aĉeti iun terpecon, kiun mi avidis deponi knabece.“ Instigite de tiu deziro li foriris al Ameriko, firme decidite sendi siajn monŝparaĵojn al la patrino. Sed longatempes ne ekzistis tiaj, kontraŭe malsato lin posedis. Kiam fine li ekprosperis, la patrino mortis, — lasta vivanta kunigilo kun la hejmlando detranĉiĝis. Post nelonge li subite edziniĝis. „La koro ne multe atentis pri ambicio, kiun homo posedas!“ kurioze li diris.

La edzino estis pola. Pro tio li ŝajne kulpigis Amerikan — se li ne estus elmigrinta tien, li ne estus renkontinta ŝin. Nun ekzistis du hejmlandoj ĉe la familio. „Edzino, ŝi ne amas Hercegovino“, li min sciigis; „ŝi venis el Kraków kaj deziras la proprajn amikojn, spiras loĝi inter ili. Mi — mi scias nenion pri Pollando.“

Tiam alvenis la infanojn. Ĉi tiuj ne estas kroatoj aŭ poloj, sed filinoj de Usono. Post kiam ili ĉeestis lerneion tri-kvar jarojn, ili rifuzis paroli ian lingvon, escepte la anglan. Nun ekzistas por la familio tri hejmlandoj.

Sed tiu ĉi viro estis kamparano, la tero lin logis same kiel magnetiŝtono. „Ho mi!“ li sopiris, „la kamparo! Neniam vaporfaŝiloj matene — neniam laborstrikioj — neniam estroj!“ Mi respondis: „Sed ekzistas abundo da tero en Usono; vi povis akiri bieneton ie en la okcidento, kaj antaŭ nur kelkaj jaroj ekzistis bonegaj terpecoj, kiujn oni povis senpage akiri.“ Li skuis la kapon. „Kial ne?“ mi demandis. „Ĉiuj amerikanoj.“ „Kaj vi ne amas ilin?“ „Ho jes, mi tre ŝatas ilin, — sed —.“ „Sed kio?“ mi demandis. „Ili ne estas mia popolo, mi ne komprenas ilin; tro soleca tie; neniu slavoj, neniu kroatoj en la okcidento.“ He, mi pensas, jen oni trovas la orientan eŭropanon; li ne taŭgas esti pioniro; li nepre devas enloĝi en sia eta mondo por kuragiĝi sin; alie li baraktas kiel fiŝo ekster la akvo. Li reprenis la vorton: „Jes, bonaj homoj, la amerikanoj! Mi ilin amas; tiel afablaj, tiel bonkoraj, tiel modernaj. Sed — malsamaj homoj. Li ne amas kroatojn, ne komprenas min kaj la edzinon. Mi vivadis inter ili ĉe Pittsburg. Jes, oni rigardis nin strange, ankaŭ ni sentis nin stranganj. Edzino, ŝi ridas multe, mi ĝuas ludi akordionon kaj kanti, post taglaboro, kaj danci. — Ho, tiel feliĉaj! Americanoj ne aprobas — tro brue, tro sovaĝe. Jes, bonegaj homoj — tri aŭ kvar. Sed la plimulto — ili min maltrankviligas. Kaj ĉu mi laboros ĉe fabrikejo dumvive? Ne. Mi deziras reiri al la kamparo. Eble en Hercegovino, se la edzino konsentos . . .“

Tradukis Otto W. Ferguson.

Zamenhof Monumento.

La monumento estas ensiĝigita en Leith, skotlanda haveno, sur la vaporsipo „Majorka“ la 16. 11. Ĝi veturos tra Libaŭ al Danzig-Neufahrwasser, kie oni atendas la ŝipon ĉirkaŭ la 30. 11. La monumento estas sendita laŭ instrukcioj ricevitaj, rekte al la Direktoro de Importa Departamento, Financ-ministro, Warszawa. La ŝip-dokumentoj „sargatesto“ estas forsenditaj de la hon.-sekr. al D-o W. Robin, prez. de la loka por-monumenta komitato, Warszawa, por transdono al la Direktoro de Importo.

J. D. A.

Anglaj impresoj.

Mia vagonaro haltis en la Londona stacidomo „Victoria“. Ĉirkaŭ mi sonis fremda lingvo, kiun mi kvankam longe lernis, tamen ne komprenis. Mi sentis min forlasita, tre sola en la potenco homomaro de tiu ĉi granda metropolo. Subite mi ekvidis mian samideaninon, kiun tre ĝentile atendis je mi, kaj ĉio ŝanĝiĝis. La muroj de la lingvobariilo malfermiĝis, kaj mi eniris la nebulan Anglujon kiel mian propran landon.

Tiel komenciĝas ĉiu priskribo de esperantista vojaĝo. Sed mi — anstataŭ amasiĝi esprimojn kiel „gesamideoj“, „karaj“, „grupo“, „kurso“ ktp., kiuj estas ja estimindaj sed iom banalaj terminoj, mi penos doni kelkajn fotoĝrafiajn pri angla vivo, kiuj sendube interesos la legantojn de ET.

Vojaĝo, vivkosto. Tiu ĉi paragrafo estas tre grava por ĉiu vojaĝanto. La ricevo de angla vizo (enirpermeso) estas ekstreme malfacila. Oni devas pruvi, ke oni kapablas pagi la kostojn de la vojaĝo, oni devas doni adreson, kien oni vojaĝas, kaj oni devas diri la celon de la vojaĝo. Post ĉio ĉi oni eble ricevos vizon por mallonga tempo. La kostoj de la vivo en Anglujo estas iom malpli altaj ol en Germanujo aŭ en Svisujo kaj ĉ. 50% pli altaj ol en la ceteraj eŭropaj landoj.

Politikaj okazajoj. Ĉar dum mia restado en Anglujo okazis historiaj ŝanĝoj en la angla politiko, mi devas senpartie priskribi ilin. En la elektadoj, la 29 okt., la konservativa partio ricevis 405, la laborista partio 151 kaj la liberala partio nur 58 lokojn en la Parlamento. Dum la mal-longa elektada batalo tiuj ĉi tri ĉefaj partioj laboradis pli fervore ol iam ĉiu kontraŭ ĉiuj aliaj. Mi ĉeestis kunsidojn de ĉiuj partioj kaj povas certigi ke ili tre diferencis de similaj kunvenoj en eŭropaj landoj. Oni ne aranĝis tre grandajn kunvenojn, kiel tio estas kutimo ĝi mezeŭropaj ŝtatoj, sed oni organizis grandan nombron da paroladoj en la gimnastikaj ĉambregoj de municipaj lernejoj. La parlamentismo, elirinta el Britujo, restis tie la plej senŝanĝa ĝis hodiaŭ. Paroladoj, kvankam ofte tre eksaltitaj, plejofte ne trapasas la limon de la parlamenta formo. Skandaloj, ĝenoj flanke de polico ktp. tute forestis. La nokton de la elektada tago la publiko amase atentis la rezultojn de la voĉdonoj. La rezultoj estis projekciitaj de

diversaj elektraj mekanismoj en la ĉefaj stratoj. La partianoj de la Laborista Partio kunvenis en la Queens' Hall, kie oni anoncadis la envenantajn telegramojn. Tiu ĉi estis la sola amas-kunveno. Ĝi okazigis grandan entuziasmon, sed la ĉeestantoj kondutis tre ĝentile eĉ kontraŭ al-partianoj.

La urbo Londono. Se oni intencas viziti Londonon, pli ol en iu alia urbo oni bezonas gvidlibron aŭ kondukiston. Kiel ni scias, Londono estas la plej vasta urbo de la mondo, konstruita sen plano, sen grandaj simetrioj. Ĝia „City“ enhavas amason da antikvaj restaĵoj, kiuj estas dissemataj inter magazenoj, trapasejoj, ktp. Neniam antaŭe mi tiel profitis mian scion de Esperanto kiel tiun ĉi fojon.

La vetero en Londono estas ĝenerale malbona, sed tute ne tiel nebula kiel oni ŝerce diradas.

Brita Imperia Ekspozicio. Tiu ĉi grandega ekspozicio ĵus finiĝis. Ĝi altiris amasegon da vizitantoj, plejparte el anglingvaj teritorioj. Ĝia arango estis modelo de granda ekspozicio. Larĝaj vojoj, grandegaj konstruaĵoj, sufiĉaj restoracioj, bonega lumigado k. k. kaŭzis la grandan sukceson de la ekspozicio. Ŝajnas ke la arangantoj komprenis, ke ne nur la enhavo sed ankaŭ la arango estas tre grava en ekspozicio. Tiom pli en kongreso. Ke la arangantoj de niaj kongresoj neniam forgesu tion . . .

Angla vivo. Estus ridinde priskribi tian grandan temon en kadro de artikolo. Mi nur donas kelkajn rimarkojn:

Kafejoj en la kontinenta senco tute mankas en Londono. Anstataŭ tiuj ili havas klubojn, kiuj tamen ne estas publikaj. Teatroj ne estas troplenigitaj, ĉar ĉiu kvartalo havas sufiĉe da ili. Sekve oni ne estas devigata atendi dum longaj horoj por poste ne ricevi bileton. (Strange por ni, ĉu ne?) Komunikiloj en Londono estas senproĉaj, tamen pro la grandegaj distancoj kelkfoje oni bezonas pli ol horon por alveni al la loĝejo de iu konato.

Esperanto en Londono. La oficejo de la Brita Esp. Asocio (BFA) troviĝas en centra parto de la urbo. La verda standardo montras ĝin de malproksime. En ĝi estas librovendejo, oficejo, biblioteko kaj legejo, kie vizitantoj ĉiam estas bonvenaj. La „Londona Klubo“ kunvenas ĉiuvendrede, kaj oni aranĝas tre interesajn paroladojn. Mi mem aŭskultis du bonajn prelegojn, kiuj multe pli utilis al mi ol deklamoj kaj kantoj en multaj aliaj grupoj, kiujn mi vizitis. Ankaŭ mi ĉeestis dancesperanton de la Londona Klubo, kie mi notis sekvantajn novaĵojn: oni disdonis balonojn kun propaganda teksto pri Esperanto, oni aranĝis interesajn ludojn kun bonaj premioj, kaj ĉefe oni parolis sufiĉe multe Esperanton. La Dimanĉa Klubo estas vere angla arangaĵo. Niaj geamikoj kunvenas tie familie, trinkante teon apud la flamanta angla forno. Laŭvice ili parolas, kaj ĉiusemajne ili elektas alian prezidanton. Per tio ili nuligas multe da personaj ambicioj, kiuj ofte malutilas al la publika vivo . . .

ja al mia amiko, la ĉefred . . . Subite terura ekpenso. Mia koro por momento ĉeŝis bati. Ĉu eble . . . ? Ĉu ĉi . . . ? Jam mi staris antaŭ la malsanulejo. Ĝenerale mi evitas eĉ la stratojn, en kiuj estas tiaj konstruaĵoj, sed nun mi eniru eĉ frenezulejon? Sed „temas pri Esperanto“, ĉi tiu konsidero estis decidiga.

Oni kondukis min tra kvin pordegoj, tra du kortoj, poste tra kelkaj senlajnaj koridoroj, supreniĝis min kvar ŝtuparojn kun 251 ŝtupoj, poste venis liftveturado al pli suba etaĝo, ree koridoroj, anguloj, salongoj, fine eĉ rond-iristuparo. — Kiel mi trovos, mi pensis, la revolveron? Sed post kvarona horo mi estis en la malsana ĉambro. Ne, ne, mi eraris, la ĉambro ne estis malsana, nur la malsanulejo estis tia.

Unu rigardo sufiĉis. Estis li. Tie li kuŝis, pala, kun duone fermitaj okuloj.

Ho, mia kara amiko en la frenezulejo! Ne tolerebla penso! Kun tenditaj manoj mi estis ĝetanta min super la lito, sed la fleĝistino mansigne enigis malpermesis.

„Bonan tagon, kara s-o ĉefredaktoro!“ mi diris eksingultante.

„Quante costa?“, li respondis kaj malfermis larĝe la okulojn. Liaj manoj serĉis nerve sur la kovril.

„10 lirojn“, mi rediris, „nur 10 lirojn, via moŝto!“ Mi ne povis alie. Hipnota forto eligis la vortojn el mia buŝo. La fleĝistino rigardis min demande.

„Do prenu mian ĉemizon, la laston, kion mi posedas, prenu ĉion, ĉion!“ kriis la malsanulo, kaj la fingroj ŝirumis ekscitite la butonojn de lia kileto.

„Eble lin turmentas cimoj“, mi rimarkigis, „certe, tiel estas, ĉar ĉiam, kiam la cimoj lin . . . nu, mi vidu!“ Jam mi forŝovis la litoŝtukon, sed la fleĝistino retenis mian brakon kaj ekkriis:

„Kion vi faras, kiu vi estas?“

Mi rektigis min en la tuta longeco, pri kiu mi disponis.

„Mi estas esperantisto. Esperanto estas la internacia interkomprenilo, eltrovita de mia Maĵstro D-o Lazaruso Zamenhof el Varsovio por la bono de la homaro. Per la interna ideo kaj en ĉi tiu signo“ — per lerta gesto mi elŝiris mian stelon — „en ĉi tiu signo ni venkos“ — mia voĉo konstante kreskis — „ni venkos, ĉar ni devas venki!“

„Helpon, helpon!“ kriigis la fleĝistino. „Frenezulo, frenezulo!“ Envenis la ĉefredaktoro — ne ne, la frenezestro, frenezestro mi volis diri — li, ankaŭ ne ĝuste, mi tute konfuziĝas, ĉu ne, Karliĉo, vi ne kredas, ke frenezeco infektas — do la frenezulejestro venis, kaj la fleĝistino forkuris.

„Lasu ŝin forkuri, sinjoro!“ Se la homoj ne volas aŭskulti nian evangelion, ni preteriru ilin! tiel diris unu el niaj plej eminentaj pioniroj — sed haltu, haltu, estas ja tamen necese, ke ŝi revenu, por ke mi preteriru ŝin, postkurru ŝin; s-o frenezestro, revenigu ŝin!“

„Kion signifas ĉi tio?“ demandis mirigite la doktoro.

„Pro mi“, mi respondis rezigne, „estas ja nur virino, sed mi turnu min al la inteligentulo. Preskaŭ en ĉiuj

Sub la suno dalmacia.*)

Tre estimata s-o ĉefred . . . ĉef . . . ? ĉef . . . ? Ho ne, li ja ne plu . . . li ja estas . . . ho, la kompatindulo. Do: estimata s-o kunred . . . kun . . . ? kun . . . ? Ne, ne, ja ankaŭ li . . . en kian regionon lin eble portis lia freneza biciklo?

Sed al vi mi ja volis skribi, restis ja nur vi, mia kara kompostista lernanto, sur kies ŝultroj, kvankam vi ĝis nun verkis nur preserarojn, kuŝas nun la tuta zorgo pri nia ŝataita ET,

mia kara, orfigita, brava Karliĉo.

Via maĵstro? Via ĉefulo? Jes, fine mi trovis lin, li ne falis sub tramon aŭ aŭtomobilon aŭ eĉ en la Reĵnon; sed tamen, la ĉefrenezulo diris . . . en tene. Ĉu vi kredas, ke frenezeco povas infekti? Mi ja estis tiel longatempes ĉe li.

„Hieraaŭ la polico kaptis viron, kiu unue promenadis trankevilte en la ĉefstrato de Köln. Sed subite li forŝiris de si ĉapelon, jakon, pantalonon kaj ŝuojn kaj disdonis ilin inter la preterpasantojn. Vesilite nur per la ĉemizo li poste kuregis tra la strato kriigante: 5000 dolarojn deficito, oni komplete nudigos min.“ Oni alportis la viron en nervomalsanulejon.“

Tiel raportis la samlenjurnelo. Mi palpis mian frunton. Kie mi jam legis ion similan? Ha, jen! Simila afero okazis

* Tion ĉi povas kompreni nur tiuj, kiuj legis la raporton de nia ĉefredaktoro pri la psikongresa vojaĝo.

Mi nun povas daŭrigi mian artikolon, priskribante la turon de Londono, ĝiajn muzeojn kaj instituciojn ktp., sed pri tiuj aferoj oni ja povas legi en specialaj libroj. Sekve kiam mia ŝipo forlasas la nebulan insulon, mi ankaŭ finas mian skribadon.

Dum vojaĝo London-Paris 1924, novembro.

Jozefo Major.

Socia vivo.

Infanlaboristoj en japanaj minejoj.

Granda malpliigo okazis je la nombro de infanlaboristoj en japanaj minejoj. Tio montriĝas per enketo farita de la japana Oficejo pri Sociaj Aferoj pri infanoj kaj gejunuloj laborantaj en minejoj dum la periodo 1918-1922, kies rezultato aperas en Informations Sociales (Industrial and Labour Informations), la semajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo.

La tuta nombro da laboristoj kaj laboristinoj malpli ol 15-jaraj malpliĝis de 6058 en 1918 al 3840 en 1922, tio estas malaltiĝo de 36 procentoj. En la karbminejoj la malaltiĝo estis 16 procentoj. En la metalminejoj ĝi estis 77 procentoj ĉe knaboj kaj 85 procentoj ĉe knabinoj. La nombro da infanoj laborantaj en metalminejoj malpliĝis de pli ol 2000 al ĉirkaŭ 440.

Kulturo.

Kulturo aŭ malhonto?

Sur stratoj de Moskvo en Ruslando aperis tute nudigitaj viroj kaj virinoj, kun rubandoj pendigitaj trans la ŝultro kaj surskriboj: „For la honton!“ Demandite de ruslandaj ĵurnalistoj, popola komisaro por san-protektado, k-do Semaŝko, eldiris jenan opinion rilate al tiu devizo: — Tiun ĉi konduton oni devas prikonsideri ĉiuflanke. Unue, — oni opinias malprave, ke la kulturo de proletaro estas antaŭ ĉio absoluta malakcepto de kapitalisma kulturo. Plej evidente eraras tiuj, kiuj kredas, ke per tio, ke oni estas tute nuda, havas maldonditajn harojn kaj maltrancitajn ungojn, oni elmontras veran revolucio-emon. Tiu ĉi aserto estas absurda. La proletara kulturo celas utiligi per laborantaj masoj ĉiujn kulturakiraĵojn per tio, ke ĝi senigas je ili la ekspluatantojn. Due, — la promenado tra moskvaj stratoj kun la korpo tute nuda estas malaprobinda pro la motivoj de higieno. Oni ne devas lasi la korpon por influo de polvo, koto kaj pluvo. La vestaĵo estas destinita por protekti nin kontraŭ akraj veterŝanĝoj, polvo kaj malbonaj kondiĉoj de la ekstera medio. Komprenible, sur marbordo en sudaj regionoj, sub la suno kaj freŝa aero, post la bano en maro, estas utile kuŝi sur la sablo tute nuda. Sed la stratoj de Moskvo ne estas ripozloka marbordo. De la higiena vidpunkto tia nudigo kaj vagado tra la stratoj estas malsaĝa.

Trie, estas tre diskutinda, ĉu tiu ĉi novaĵo ne estas malutila por moraleco. En la nuna momento, kiam ne estas eliminata la prostituo, mal-

disciplineco, la absoluta nudigo akcelas nur la malmoralecon. —

— Tial mi opinias, — konkludis k-do Semaŝko, — ke estas necese forigi tiun ĉi nekvenajn, eĉ, se estas necese, per punrimedoj.

N. Krassovskij.

Scienco.

Mineralogio.

La reĝo de la gemoj.

La diamanto tenas sendube la unuan lokon ĉe la gemoj, ne sole pro siaj valoro kaj romantiko, sed ankaŭ pro siaj hemiaj propraj. Ĝiaj propraj aĵoj de reflektado kaj linia malrektigo de la lumo donas al ĝi neimitablan brilecon. Ĝis nun ĝi estas la plej malmola substanco jam eltrovita, kaj pro tio oni opiniis ke ĝi povas kontrastari ĉiajn atakojn, tial ĝi nomiĝis la diamanto (malmoaleĝaĵo) aŭ „la Nevenkeblulo“. Tamen ĝi estas tre rompigema, kaj kvankam nefluidigebla, ĝi povas esti elbruligita per la grandega varmo de elektra arko. Sed la plej stranga fakto pri la diamanto estas, ke ĝi konsistas el la sama substanco kiel la grafito de grafitkrajono aŭ la fumigraĵo de lampo, karbono, sed ĝiaj molekuloj tamen estas ordigitaj laŭ malsama maniero. Ni ĉiuj elspiras ĉiun horon sufiĉan karbonon, en la formo de karbonacida gaso, por formi 100 karatan diamanton valoran 20000 funtojn anglajn!

Diamantoj en sia natura stato ne montras sian planan fajron kaj belecon, sed estas nesimetriaj kaj neklaraj. Por montri ĉi tiujn ecojn ili devas esti „trancitaj“. Por fari ĉi tion ili unue fendigas per diamantfrancilo „kaj poste grincigas sur radoj je diamantpolvo kovritaj. Ĉi tiuj gemoj trancigas laŭ diversaj formoj tiaj kiaj la „roza“ kaj „brilanta“.

La historio de la diamantinado abundas je kuriozaj okazaĵoj. La unuan brazilian diamantojn oni uzis kiel ludmarkojn por kartludado; la unua sudafrika diamanto estis ludilo de infano; kaj diamantoj estas trovigitaj en la muroj de domoj kaj en la gorĝoj de korbirdoj, dum multaj estas forĵetitaj kiel nevaloraj.

Multaj strangaj legendoj kaj kredoj estas kolektiĝintaj ĉirkaŭ la diamanto.

La antikvuloj supozis ke la bufo portis gemon en la kapo; kaj la drakoj kiuj laŭkrede enloĝis la Alpojn, posedis la saman strangajn, kaj la bonŝancelo, kiu trovis dormantan drakon kaj, riskante maldormigi ĝin, eltrancis la gemon, estus vivlonge riĉa. Gemoj uzigiĝis kiel talismanoj en amo, miĝis kaj ĉiaj danĝeroj kaj estis konsiderataj kiel bonŝancaj aŭ nebonŝancaj, sed neniam neŭtralaj. Originalaĵo de Leslie E. Thomas.

Komerco.

Foiroj kaj ekspozicioj en Svislando 1925.

La 9-a Svisa Specimena Foiro en Basel okazos de 18 ĝis 28 aprilo. La foiro de Lausanne (ter-

kulturo, nutraĵoj kaj brutofiro) estos frugita per la svisa terkultura ekspozicio kaj okazos de 27 junio ĝis 12 julio. Dum la samaj tagoj estos en la haloj de la lausanea foiro „internacia foiro de produktaj koloniaj kaj alilandaj“, t. e. ĉiuj produktaj, kiujn Svislando estas devigata importi el eksterlando aŭ transmare. — Dum la monato septembro okazos en la ĉefurbo Bern kiel la tria granda svisa manifestacio ekonomia de 1925 la svisa terkultura ekspozicio. Pl. Hr.

Importo kaj eksporto de Svislando.

La svisa importo atingis dum la tria kvaron-faro 1924: 619 milionoj da svisaj frankoj kaj la eksporto 490 milionojn, diferenco = 129 milionoj aŭ 20,9%. Dum la tri unuaj kvaronjaroj 1924 estas la importo 1801 milionoj kaj la eksporto 1468 milionoj, do la diferenco 333 milionoj aŭ 18,5%. En 1923 atingis la importo dum la tri unuaj kvaronjaroj nur 74% de tiu de 1913 kaj ĝis la jaro fino 80% dank' al la granda importo de la kvara kvaronjaro; 1924 ĝi atingis jam en la tri unuaj kvaronjaroj 86%. Al tio partoprenis ne nur nutraĵoj kaj fabrikaĵoj, sed precipe ankaŭ krud-materialoj uzitaj por la eksportproduktado. En la eksporto de monato al monato alternis progresoj kaj malprogresoj, jen en tiu, jen en alia industrio, ĝis fine en septembro estas atingita konsiderinda pliboniĝo de la tuta industrio. La eksporto de oro estas en la tri unuaj kvaronjaroj 1924: 119 milionoj kaj la importo 10 milionoj; la eksporto de arĝento 12,8 milionoj kaj la importo 6,3 milionoj da svisaj frankoj. Pl. Hr.

Kaŭĉukaj plantejoj en Agaristano (Kaŭkazo).

En Ĉihidzir kaj Ahalseni (apud Batum en Kaŭkazo) dum nuna somero oni eksperimente plantis kaŭĉukon sur areo de 6 hektaroj. Oni sukcesis ricevi la plej bonajn specojn de kaŭĉuk-semoj, kies taŭgeco por tie estas eksperimente pruvita. Post du jaroj oni intencas pligrandigi la areon sub kaŭĉukaj plantoj ĝis 4000 hektaroj. Oni esperas ankaŭ aliri al kaŭĉuk-plantado lokajn indiĝenojn, kiuj sin okupas pri ter-kulturado. La ŝtataj entreprenoj de la regiono ankaŭ intencas organizi kelke da kemi-uzinoj por pogranda produktado de teobromino, kofeino, tanino, kreozoto ktp., kiuj kiel la plej bezonataj medikamentoj por medicino estis ĉiam importataj el eksterlando. Tiurilate faritaj provaj eksperimentoj tre sukcesis. N. Kr.

Radio.

En Esperanto

parolos s-o Dir. Glück pri la sukceso de la Radio-ekspozicio kaj Radio-Foiro en Berlin, dimanĉon 7 dec, tagmeze je 12 h. MET, el stacio Königs-wusterhausen, sur ondo 2800.

Kiu aŭdis la paroladon de 30 nov. (komparu ET 2201) aŭ kiu aŭskultos la ĉi-supre anonciatan paroladon, bonvolu sendi mallongan sciigon al Dir. J. Glück, Berlin W. 35, Potsdamersir. 113, Haus V.

lernejoj de la mondo ĝi jam estas enkondukita; la ĉina ministro por scienco kaj arto . . .

„Permesu, ke mi ekzamenu vian pulson!“
La doktoro estas freneza, mi pensis mire.
„Kian rilaton havas mia pulso kun Esperanto? Sed tamen, se tio malpezigas vin, kaj via bopatrino konsentas pri tio, jen!“

Li palpis kaj kapskulis.
„Pro kio vi estas ĉi tie?“ li demandis.
„Ĉu tio estas fakte frenezulezo?“
„Certe, vi povas resti, aŭ pro kio alia vi venis?“
„Li estas mia amiko.“ Mi montris al la malsanulo.
„Diru, s-o ĉefrenezulo, vi ja estas kompentata: ĉu oni povas sonĝi du fojojn la samon, precize la samon?“
„?? Stranga homo!“ li murmuris. „Ĉu vi hodiaŭ jam trinkis ion?“
„Trinkis? — Stranga demando! etendu . . . jes, kafon!“
„Ne, ne,“ li ridetis, „ĉu bieron aŭ brandon aŭ vinon?“
„Ha, tio estas alia afero. Sed ne faru el vi elspezojn pro mi; tio ne estas necese. Generale mi ja ne . . . hm, hm, sed . . . se vi nepre . . . nur por esti kompleksa al vi . . . mi escepte ne rifuzas.“
„Ĉu vi konas la malsanulon?“
„La malsanulon? Ĉu vi ne opinias, ke alkoholaĵoj malutilas al li? Mi ja ne fimas ion por mi, kvankam mi ja generale . . .“
„Li ne volis kompreni. „Ne diru sensecaĵojn! Do vi konas lin?“
„Jes!“

Li ekoleriĝis. „Stultulo, do kiu li estas?“
Mi alprenis majestatan pozon. „Mi havas la honoron, prezenti al vi la ĉefredaktoron de la mondama gazeto „Esperanto Triumfonta“, Esperanto en ĉiuj sferoj, ĉe poŝto, telegrafo, polico, radio . . .“

„Silentu, silentu! Do redaktoro li estas?“
„Ĉefredaktoro, sinjoro doktoro, ĉefredaktoro; la kun-redaktoro ankaŭ kelkaj semajnoj . . .“
„Sajnas, ke la sinjoro estas iom tro okupata. Kion li faris ĉefe dum la lasta tempo?“

„Li sonĝis; eĉ du fojojn la samon.“
„? ? Songis? Ĉiam?“
„Ne, nur kiam la puloj kaj cimoj pikis lin.“
„Ĉu vi fakte . . . ?“

„Ĉu vi aŭdas? Vidu, jen jen!“ La malsanulo estis rektiginta, malfermis la okulojn, gestumis en la aero kvazaŭ defendante kaj kriigis: „Ho, ho, forprenu la bestegojn, tuj forigu ilin, ili formangigos min!“

Ankaŭ mi eksciĝis. „La cimoj, s-o pulestro, vi havas cimojn; helpu min, ni portu lin en pli puran ĉamboron!“
La doktoro per la pugnoj reŝiris min.
„Vi fakte frenezigis. Respondu nun sprite, aŭ mi venigos la varlistojn. Diru, kio entute okazis al via amiko?“

„Okazis? — Li — li — li — jes, li saltis el fenestro, el la sesa etaĝo, ĉar li perdis manuskripton.“
„Aha! Fine lumeto por la diagnozo.“

„Ho, se vi bezonas lumon, mi volonte helpas vin. jen tuta skatolo da patentitaj alumetoj!“
„Frenezulo uol! Sed pro perdita manuskripto oni ne saltas el la fenestro.“

„Tion vi ne komprenas, sinjoro diagnozisto, efektive li ja ne perdis ĝin, sed li ne legas gazeton, eĉ ne sian propran; pro tio li devis sonĝi du fojojn la samon.“

„Komprenu, kiu povas! Redaktoro, kiu . . .“
„Ĉefredaktoro, mi petas, ĉefredaktoro!“
„Pro mi! Do ĉefredaktoro, kiu multe songas, kiu perdis manuskripton kaj saltis el la fenestro! Tion komplikitan aferon mi ĝis nun ne havis. Sed sajnase, ke temas pri la ĝis nun nekoniata songmalsano, simila al la dormmalsano. Eble vi povas diri al mi aliajn rimarkindaĵojn el lia lasta-tempa vivado?“

„Ho, jes! Li havis la marmalsanon kaj kuŝis foje flankon de flanko kun bela japanino.“

„Ha, ni alproksimiĝas al la solvo. La amo kaj la tropika varmego, mi divenas; ne ĉiu povas elteni ilin. Kie li vojaĝis?“

„Sub la suno dalmacia
Kreskas amo en la koro . . .“

jen la malsanulo laŭvoĉe deklamis.

„Kion li diras?“

„Ĉu vi ne aŭdas, sinjoro divenisto, en lia koro kreskas io.“

„Kaj ankaŭ en via cerbujo!“

„Rapide, rapide, helpu lin, helpu lin, tuj operaciuj lin kaj forigu la kreskaĵon.“

La malsanulo ekĝemis, turniĝis maltrankvile. Malesperante mi komencis kuradi tra la ĉamboro.

„Sub la suno dalmacia
Vagas mi kun kor' ebria . . .“

daŭrigis la malsanulo.

„Li mortos,“ mi kriigis, „havu vi kompaton, helpu lin, lia koro jam ebrigiĝas!“

Sed la senkompatalo nur malhelpis min. Mi ne plu scelis, kion fari. Mi ekkaptis la akvobotelon de sur la tablo kaj ŝulis la tutan enhavaĵon sur la bruston de mia suferanta amiko.

„Tio certe malpezigos lian korpremiĝon.“

„Malŝelulo, kion vi faras?“ kriigis furioze la doktoro kaj forŝiris min de la lito.

„Ho, ho,“ vekriis la malsanulo kaj kun kortusa ekĝemo li ekplendis:

„Sub la suno dalmacia
La felici' fornaĝas jen.“

Tio estis tro. „Nun eĉ lia felici' fornaĝas,“ mi laŭvoĉe alkrigis al la doktoro, „tio estis via kulpo. Savu almenaŭ lian feliciĝon, forigu la akvon, fermu rigle la pordon, por ke la feliciĝo ne povu foriĝi!“

Per salego mi atingis la pordon. La freneza doktoro sin jetis kontraŭ min; mi batalis kun li — seĝoj, tabloj renversigis. La doktoro kriigis pro helpo. De ekstere al-

rapidis homoj. Kvar, ses, ok pugnoj ekkaptis min, kaj malgraŭ mia energia defendo oni forportis min el la ĉamboro.

„Ho, nun li devos morti, morti por la nekompreno de vi frenezaj blaŭoj!“ mi protestis; sed oni fermis per tuko mian buŝon.

Nun mi kuŝas en malhela ĉamboro, „por ke oni observu mian spiritan stato“, ili diras. Sed mi tute ne respondas iliajn frenezajn demandojn, por ne mem farigi fr . . . ho, la terura urto, ĉu ne, kara Karlejo, ĉu ne, vi ne kredas, ke frenezeco estas infekta? Mi petas vin, skribu tion tuj al via malŝelita amiko

Kristiano Mallerta.

Rimarko de Karlejo: Ŝas nas fakte (kun bedaŭro mi devas konstati), ke ĉi tiu malsano infekta kaj ke la frenezeco ĉe nia s-o M. jam atingis tre timindan gradon, ĉar mia ĉefulo estas helme, pli sana ol iam, laboras, laboregas kaj neniel pensas pri frenezigo.

Sopirbildoj.

De Viljo Kolo.

le, en granda urbo,
kie ŝtonaj muroj
baras sunlumadon,
ekflugas kelkfoje preter mian animon
klaraj bildoj
pri kelkaj temperoj de mia vivo.

Ili ne iras sinsekve.
Ili estas disaj,
nedependantaj de tempo.

Mi vidas iam florantan arbon
apud polva vojo de vilaĝo
kaj ruĝan ĉevalon en abunda herbaro.

Mi povas samtempe vidi bluan lagokulon,
aitan rokon kaj serenubnon,
liun muskolkovrigintan tegmenton kaj korton.

Mi ekĝoĝigas sammomente pro la rigardo,
kaj jam ensorcis mian koron,
kaj mi vidas belan manon kolekti florojn.

Aŭ mi memoras sunbrunigitan vizaĝon,
de kiu brilas sano kaj ĝojo. —
Tiam estis esio malfacia.

Mi volus liberiĝi for, malproksimen —
en sunlumadon,
sur lagobordon,
kie balanciĝas kanaro
kaj varmaj ondoj muĝetas.

El finna lingvo trad. Joh. Evd. Ruotsalainen.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj komplete informara, ni bezonas sceligon (sur poŝtikarto aŭ aparta folieto nunflanke skribita, sed ne inter administrativaj aŭ privataj sceligoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Eŭropo.

Aŭstrio.

Kierling. Ekzistas grupo „Sub la verda stelo“ s-ano E. Herndl.

Klosterneuburg. Ekzistas esp. rondo, adr. ĉe UEA-del. — Lab. Esp. Societo, prez. R. Wasserbauer. — Inform-ejo „Esp. Servo“, gvid. E. Ebner kaj H. Leidmayr (informoj) ĉiutage Martinstr. 59—61 kaj 69). — Nova kurso komencas ĉe loka instituto „Urania“ la 5. 12. gvid. UEA-del. A. Schauer.

Weidling. Vigle laboras s-ano kolonelo Neumann-Wördern. Kurso baldaŭ finiĝos, poste grup-fondo; gvid. s-ano Scholz; dum dec. estas zamenhofa festo.

Britujo.

Liverpool. La movado en ĉi tiu distrikto iras antaŭen, kvankam kun malrapidaj paŝoj. La grup-kunveno okazas regule ĉiuvendre kun bona programo. Dum la unua horo okazas tri diversaj kursoj, poste okazas regulaj paroladoj, debatoj kaj drama-societaj vesperoj. Unu vesperon en la monato oni dediĉas aparte al knaboj de la lernejo, kie oni oficiale instruas Esperanton. En Wallasey kaj Birkenhead, proksimaj najbaroj de Liverpool, ankaŭ okazas kursoj kaj regulaj vesperoj ĉiu-semajne per esperantistoj. Prof. Collinson el la Liverpoola Universitato faris propagandan paroladon lastan semajnon ĉe la literatura fako de Dovedale Brotherhood, kiu faris bonegan impreson sur multaj instruistoj kiuj ĉesis, kaj nia sekt. f-lino Swan nun penas starigi esp. kursojn en tiu sektoro.

Mezlanda Federacio. La sekretario raportas, ke vigla movado regas en tiu distrikto. Anaro kreskas de tago al tago, kaj multaj klasoj por komencantoj funkcias en diversaj partoj de la federacio.

S-o Goldsmith, la sekr. s-o Perolant el Sheffield kaj s-o Appleby faris kelkajn prop. paroladojn dum la lastaj semajnoj en diversaj lokoj. La tuta laboro estas por prepari la distriktan popolon por la akcepto de la Brita Esp. Kongreso kiu okazos en Leamington-Spa en 1925, kiu kuŝas en tiu federacio. La 56-a Kvaronjara Mezlanda Federacia-Konferenco okazos en Cheltenham, sabato, 16. 1. 1925. Ĉiuj federacianoj estas petataj ĉesiti tiun konferencon.
J. D. A.

Ĉeĥoslovakio.

Jägerndorf. La 1. 10. komenciĝis 5 kursoj por komencantoj. Prof. Huttarsch gvidas en la reallernejo kurson kun 14 p., ing. Aŭrich kurson kun 20 p., ing. Kreisler kurson en la laborista hejmo kurson kun 18 p. La progresintoj instruas s-o Horn. Kunveno ĉiunvendre je 8 h. en „Stadtkaffee“. La fervoraj jägerndorfanaj aranĝis ankaŭ kursojn en Troppau kaj Römerstadt kun bona sukceso.

Danujo.

Aarhus. 14. 11. f-lino Jacobs el Flensburg (Germ.) faris en Esp. Konversacia Klubo esp. paroladon pri „esenco, celo kaj disvastiĝo de Esp.“, interpretis s-o Hvorslev; ĉe-esis 70 p. — Allan tagon f-lino Jacobs vizitis Grenaa, laŭ peto de s-ino Mammen. Tia propagando ŝajnas esti tre taŭga.

Finnlando.

Esperanto-movado en Finnlando.

En la lastaj tempoj Esperanto-movado en Finnlando estis iom silenta, sed tamen certa progreso estas rimarkinda.

En grandeta gubernia ĉefurbo Kuopio fondiĝis nova esp. societo en komenco de oktobro. Tie troviĝas kelkaj lertaj kaj fervoraj samideanoj. Magistro Vilho Setälä paroladis pri nia lingvo al entuziasma publiko la 16. 10. en la sama urbo. Kurso estos tuj komencata.

Esperanto estas instruita almenaŭ en Laborista kaj Libera (settlement) instituto de Helsinko kaj en dairigaj kursoj de la popolernejoj de Koljola (instruistino Sofia Salla) kaj Salminen (staciostro H. Salokannel).

En Salminen ĉ. 50 gelnarantoj vizitas la kurson kaj iom pli malfrue versajne fondiĝos societo.

Esperanto estas plue instruita en popola lernejo de Iso kyllä (Laihia, instr. Irmari Manner).

Direktoro Mikko Alava donas senpagajn kursojn en urbo Vaasa kaj ĵus verkadas tute novan korespondan kurson, el kiu aperis jam du „instruiletoj“. Koresponde instruas plue „Esperanto-Instituto de Finnlando“ (Helsinko) kaj la „Korespondanta Instituto de Viipuri“.

„Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj“ akiris al si la rajton per fervoja administracio fari libervolan priesperantajn lecionojn al fervojistoj de iliaj lernkursoj. La societo publikigis ankaŭ konkursojn pri verkado de reklaĵaĵo por stacidomoj.

Pseudonimo „Kontraŭalkoholisto-esperantisto“ en kelkaj finnlandaj gazetoj esprimis deziron korespondi pri fono de internacia ligo por abstinenco kaj malpermesa leĝo. Li atendas respondojn sub adreso stacio Salminen (Finnlando).

La ĝenerala opinio en kelkaj rondoĵoj de Finnlando estas tre esperantema, kvankam ekzistas, kompreneble, ankaŭ skeptikuloj. La gazetaro, cetere, tre simpatie rilatas al Esperanto.
H. W. S.

Germanujo.

Annaberg-Buchholz. La grupa vivo plivigliĝis. La 16. 10. faris la estro, instruisto Krämer, publikan propagand-paroladon pri „Esp. moderna kulturfaktoro“. La gazetaj raportoj detale. Komenciĝis kurso kun 20 p., gvid. s-o Krämer. Kursprezo: 5 rmk., libro: Otto. La fervoro de la gekursantoj kreskadis. La 29. 10. parolis la estro en Cranzahl.

Berlin. Komencis kurso en Darmstädter und Nationalbank, Berlin; 5 p. Post ĉesigo de la maldungado eble okazos nova kurso. La bankestraro disponigis ĉambelon.

Euskirchen. En la tiu ĉi jaro fondita loka grupo havas nun 28 membrojn kaj ĝi vigle laboras. Novaj kursoj por komencantoj komencis en oktobro kun 46 partoprenantoj, gvid. telegr. insp. E. Kind, del. UEA. La grupo aliĝis kiel membro-subtenanto al UEA. Grandskala prop. ekspozicio estas projektata por marto, al kiu la grupo petas pri la subteno de la tiumonda samideanaro (vidu anoncetojn).

Honnef am Rhein. 19. 11. en Kath Gesellenverein (Katolika Juneklasiista Unuiĝo) parolado de s-o Wilh. Solzbacher pri Esperanto kun proleciono. Kurso komenciĝos. Ĵurnalo enhavis longan raporton.

Wipperfurth. Studas Esperanto grupo de Moka (Mondjunularo Katolika). Gvidas s-o Wilh. Halfos.

Ruslando.

Astrahan. 16. 11. En domo de Klerigado s-o N. Rodionov gvidas esp. kurson. — 19. 11. En Vodoprovd (akvokonduko) refunkciis esp. rondeto, gvid. B. Averin. — Baldaŭ refunkciis esp. rondeto ĉe Zavodo „Kanivo“, gvidas A. Majorov. — En Domo de Klerikado ĉiudimensie de 18—20 h. estas liberaj kunvenoj de geseperantistoj.
B. A.

Svislando.

Bern. 20. 11. prop. parolado de s-o Jak. Schmid, ĉe kiu okazis diskuto kun idistoj. Kelkaj personoj enskribiĝis por kurso post novjaro.

Esperanto en Lernejo.

Flensburg. Germ. Okazas kurso aranĝita de la urba media faklernejo, partoprenas 15 gejunuloj, gvid. f-lino Jacobs.

Leterkesto.

Esp. lernantinoj en Normala Lernejo de Ston. Koran dankon pro via atabla letero! Datrigu vian fervoron! Via estas la estonico!

K. G. en Kr. Dankon por scigoj!
F. P. en B. (Pol.) Por via gazetosendaĵo ni pagis punafankon de 0.20 mk.

O. K. en Islando. Dankon por letero de 19. 10. kaj manuskriptoj. Islandajn literojn ni ne posedas. Artikolojn el ET vi rajtas traduki.

L. en R. Redakciajn notojn skribu sur aparta folio, ne en letero inter administraj aferoj! Skribu legeble!

Maza Mizutani kaj aliaj japanaj samideanoj. Vi sendis respond-kuponon, kiuj ne plu validas, kankam la stampo estas nova. Respond-kuponoj devas havi ruĝan surpreson dorsflanke.

G. G. en L. Dankon pro kartoj! Vidu la ateniĝon en hodiaŭa numero!

Progresema kritikotaro. Ni publikigos vian artikolon, sed aniaŭe ni devas scii vian nomon.

W. W. en E. Bv. mem skribi al la eldonejo de la kanto!

FER-MAGAZENO

ŝraŭboj ĉiuspecaj, dratsiftoj.

Ekstremaĵaj prezoj.
Postulu oferton!

Hermann Dix, Zeulenroda
Turingio Germanujo

Presejoj!

La presado kaj ventuato la liverado de papero kaj kiliŝoj por amas-eldonaĵoj de libroj estas akirebla.

Kontraŭ 2 sv. fk. aŭ egalvaloro estas sendata kielkur kun detalaj kondiĉoj. Skribu tuj al Postfach 6557, Bissone-Lugano (Svisl.)

La plej bela donaco por kristnasko kaj novjaro estas

Terpophon

Miniatur-fonografio por domo, sporto kaj vojaĝo.

Terpophon estas:

perfekta anstataŭaĵo por granda aparato!
Konstruita je uzado de figarba ligno, elegante farita el zaji bona polurita nobla ligno.

Terpophon havas:

kunsvingantan resonon-plankon, pro tio planan molan kaj tamen fortan sonon.

Dimensioj: 8 1/2 x 10 x 24 1/2 cm. Pezo 1,2 kg.

La plej granda disko estas facile ludebla.

Prezo nur: UŜA-dolaroj 14,5 inkl. pakajo.

Unuaranga orfento por reprezentantoj.

Reprezentantoj serĉataj en la tuta mondo.

Liverado de ĉiaj muzik-instrumentoj.

Fr. Falk, Auerbach (Hessen), Germanujo.

Fako: muzik-instrumentoj.

Mi estas aĉetanto

de
aveno
hordeoj
ostoj
kornoj
vagon- aŭ ŝpilveradoj. Ofertojn kun specimenoj sendu al
Komercentrepreno Dubach,
Bissone-Lugano (Svislando).

Anoncetoj.

Anoncetoj (nur akceptataj pro minimumo du sinekvaj impresoj) kostas po du impresoj kaj po 30 vortoj egalvaloro de 1.80 sv. fk. — Anoncetoj pri korespondaj interesanoj kostas po du impresoj kaj po 15 vortoj (krom unua adreso) egalvaloro de 1.20 sv. fk. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fandiĝo, edziĝo, morto, okazintaĵaj gravaj esp. kunvenoj, paroladoj, festoj k. s.) estas senpagaj (unufoja impresoj). — Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperado.

NASKIĜO. Al ges-oj Joh. Kratochvila, instr. en Sered, Ĉeĥoslovakio, naskiĝis filineto nomita Lucia Olga. [1]
MORTO. Mortis la patro de nia s-ano M. Dudás en Orsova, Banato, Rumanio, la 11. 11. [1]
MORTO. La 15. 11. mortis en Dresden, Germ., s-ano Wilhelm Schimmel je aĝo de 93 jaroj. [1]
S-INO KLARA ZAMENHOF petas scigi, ke ŝi estas tre malsana kaj ke pro tio ŝi ne povas respondi la multnombrajn leterojn. [2]

HELPU BONKORULOJ! Mi havas en manuskripto grandan originalan romanon „Sen titolo“, kiun mi cedos malkare al ĉiu, kiu helpas al mi mone daŭrigi edukadon de miaj infanoj en la urbo. Skribu al J. Ŝirjag, Baklanka, gub. de Vologda, Rusujo. [5]
KIU VOLAS ELDONI la plej bonan verkon de Rabindranath, Tagore (La gardenistoj) tradukitan de mi kun la permeso de l' aŭtoro? Estas vere domage, ke nia literatura perlo devas kuŝi manuskripte jam du jarojn kaj ne povas trovi eldoniston. — Edvardo Wiesendorf, L. K., Varsovio, Polujo, Biala 5. [2]

RADIO! TELEGRAFO! POŝTO! Mi deziras interesanĝi ĉiuspecajn il. PK (bfl.) kaj eksterlandanojn. Speciale mi ŝatas PK, kiuj prezentas poŝto-, telegrafo- aŭ radio-oficejojn interne aŭ ekstere. E. Kind, telegrafa inspektoro, Del. de UEA, Euskirchen, Oststr. 28/II (Germanujo). [2]
ZAMENHOF-VEPERON aranĝos Hung. Esp. Soc. Lab. la 12. 12. je 7.30 h. vespere, Dohany-u. 71—1. Senpaga eniro. [1]

GRAVA! Por atingi la enkondukon de l' Esperanto en la ĉi tieajn lernejojn kaj por pruvi al la ĉi tiea publiko kaj urberistaro la disvastiĝon kaj uzon de nia lingvo, ni intencas aranĝi dum marto kiel eble plej grandan esperantan ekspozicion kaj ni urĝe kaj korege petas la internacian samideanaron sendi al ni kiel eble plej multajn esperantaĵojn aŭ il. PK (bfl.) el ĉiuj partoj de la mondo. Ni kvintancos ĉiun sendaĵon el il. PK, se la sendinto deziras Esperanto-Grupo „Obsine antaŭen“, Euskirchen, Prez.: E. Kind, del. UEA, Euskirchen, Oststr. 28-II (Germanujo). [2]
MIA KRISTNASKA KAJ NOVIARA DONACO! Mi deziras montri al la urberistaro kaj la lerneja komisiono, ke oni per anonco povas havigi multnombrojn belajn il. PK aŭ kartojn kiuj koncernas Esp. Mi ankaŭ atendas, ke eĉ brazilaj, japanaj, grekaj kaj diversaciaj amikoj sendos propagandmateriaĵon al samideano en la alta nordo. Mi respondos tuj per samvaloraĵoj. Mia maniero memorigi nian majstron estas senlaca laboro. S-ino Magda Mammen, del. UEA, Grenaa, Danlando Gvidlibrojn, gazetojn kaj fotografajojn mi volonte akceptos. [1]

ESP. EKSPOZICIO. Por akceli la sukceson de nia movado ni aranĝas Esperanto-ekspozicion kaj petas ĉiujn eldonejojn, redakciojn, societojn kaj opajn esperantistojn helpi nin per alsendado de ĉiuspecaj esperantaĵoj. Elkoran antaŭdankoj! Esperantista Klubo Domazice-Cechy, Ĉeĥoslovakio. [1]
ESP. EKSPOZICIO. La Esp. Domo en Milano, Italujo, Via Spiga 29, dezirante malfermi esp. ekspozicion, antaŭdankante petas al la samideanaro ĉiuspecajn esperantaĵojn. [1]
5-Frankan Poŝmarkon: de BRŬSELA EKSPOZICIO 1924 mi interesanĝas kontraŭ kolekte de ĉiuj germanaj PM novelonitaj en 1924. Skribu al E. Hendrickx, Markgravelei 199, Antwerpen (Belg.). [1]

PETO. Gesamideaĵoj ĉiulandaj! Redaktoroj! Helpu al nia propagando! Sendu almenaŭ po unu PK ilustritan kaj gazeton servontajn en la aranĝota ekspozicio de nia grupo dum marto por pruvi, ke Esperanto estas disvastigita. Koreĝajn antaŭdankoj! Adreso: Esperantista grupo „Sukceso“, urbo Vraca, Bulgario. [1]
SIAN ESP. BIBLIOTEKON (tre maloftaj libroj kaj gazetoj grandpartaj binditaj) vendas kaj lofonaron nur al serioza, aĉetemojlo sendas: Iv. Krestanoff, en Pirdop, apud Sofia, Bulgario. [2]
DANA OFICISTO deziras postenon kiel helpanto en la banka, komerca aŭ teknika branĉo; scias la skandinavian, germanan, anglan kaj internacian lingvov. Deziras iri al Francujo, Belgujo, Holando, Ĉeĥoslovakio aŭ volonte al Svedujo. Ne postulas alian salajron. Ĉu estas veraj esperantistoj, kiuj legas la anoncon? Donu apogon al vera medesta samideano. Volonte li instruos Esperanton al la familianoj. Skribu tuj al Esperanto grupo, delegitino de UEA, Grenaa, Danlando. [2]

Korespondado kaj Interanĝo.

La morala devo de ĉiu anoncinto estas respondi almenaŭ unufoje al skribintoj pro anonceto. Bonvolu sciigi al ni la nomojn de nerespndintoj!

Bazilo Averin, Rusujo, Astrahan, Poŝteno 14. Filat. rĝna bileto N-o 165 ĉerez Uĝinomocenoĝeno v. Moskve. Tverskoj bul. 12.— Interanĝos PM kaj papernomojn. (Ne sendu germanajn kaj ĉeĥoslovakajn PM!) Sendu kvankam 1000 pecojn sed ne sendu pli ol 10 pecojn de la sama speco, alie oni konfiskos vian sendaĵon! Mi respondas ĉiam. [4]
Ĉu iu azia viro aŭ virino, junā aŭ maljuna, volas korespondi kun sveda sinjorino pri religiaj aŭ seriozaj aferoj? S-ino Henny Widström, Tegen 4, Lidings villa-stad apud Stockholm, Svedujo. [2]
La anoj de „Esperanto-Bildungsverein Supren“ interesanĝas PM, PK il. bfl., L kun la tuta mondo. Wien VII., Kaiserstr. 56 (Kaffee). [2]

S-o J. I. Piet, Willemsstraat 95, Eindh vren, Nederlando, deziras interesanĝi PM kaj tutaĵojn. Korespondas esperante, anĝe germane, france, holande. Sendu nemon, skribu unue. [2]
Mi deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Kolektas PK il. S-o Ake Lilliesirand, Karlslundsgatan 9, Örebro, Svedujo. [2]
S-o Gustav Ahlberg, St. Johannsstraat 26, Upsala, Svedujo, deziras interesanĝi il. PK kaj PM. [1]
Mi deziras korespondi kun la tiumonda „Boy Scouts“ organizacio kaj precipe interesanĝi fotografajojn el ilia vivo. Sendu kaj skribu al Stanimir Popadić, skolmastro, Stari Beĉej, Jugoslavio. [2]

Harold W. Kline, 4818 Trinity Place, Philadelphia, Penna, U. S. A., deziras korespondadi, PK aŭ L, kun nesekaj biblio-studentoj. Ankaŭ petas informon de iu pri la akiro de la komplete esperanta malnova testamento, kie aĉetebla ktp. [2]